DUA DIMANĈO POST KRISTNASKO -3an de januaro 2010

LA VORTO FARIĞIS KARNO KAJ LOĞIS INTER NI – Komentario al la Evangelio de p. Alberto Maggi OSM

Joh. 1, 1-18

[En la komenco estis la Vorto, kaj la Vorto estis kun Dio, kaj la Vorto estis Dio. Tiu estis en la komenco kun Dio. Ĉio estiĝis per li; kaj aparte de li estiĝis nenio, kio estiĝis. En li estis la vivo, kaj la vivo estis la lumo de la homoj. Kaj la lumo brilas en la mallumo, kaj la mallumo ĝin ne venkis.]

De Dio estis sendita viro, kies nomo estis Johano. Tiu venis kiel atestanto, por atesti pri la lumo, por ke ĉiuj per li kredu. Li ne estis la lumo, sed li venis, por atesti pri la lumo.

[Tio estis la vera lumo, kiu lumas al ĉiu homo, venanta en la mondon. Tiu estis en la mondo, kaj la mondo per li estiĝis, kaj la mondo lin ne konis. Li venis al siaj propraĵoj, kaj liaj propruloj lin ne akceptis.

Sed al ĉiuj, kiuj lin akceptis, li donis la rajton fariĝi filoj de Dio, al la kredantoj al lia nomo, kiuj naskiĝis nek el sango, nek el volo de karno, nek el volo de homo, sed el Dio.

Kaj la Vorto fariĝis karno kaj loĝis inter ni, kaj ni vidis lian gloron, gloron kvazaŭ de la solenaskita de la Patro, plena de graco kaj vero.]

Johano atestis pri li, kaj kriis, dirante: Ĉi tiu estas li, pri kiu mi diris: Kiu venas post mi, tiu estas metita super mi, ĉar li ekzistis pli frue ol mi.

Ĉar el lia pleneco ni ĉiuj ricevis, kaj gracon post graco.
Ĉar la leĝo estis donita per Moseo; la graco kaj la vero estiĝis per Jesuo Kristo. Neniu iam vidis Dion; la solenaskita Filo, kiu estas en la sino de la Patro, Lin deklaris.

En la Prologo al sia Evangelio, Sankta Johano resumas kaj anticipas ĉion kion li poste esprimos laŭlonge de la tuta rakonto en sia verko. Sekve ĉiu vorto estas tre enhavriĉa. Ne eblas en la mallonga daŭro de homilio kaj eĉ ne en la tempoj al ni lasitaj dum tiu ĉi elsendo ekzameni la tutan tekston.

Tiam, ni faru tiamaniere, ni komencu je la fino por ekzameni almenaŭ la plej gravajn liniojn. La evangeliisto finas sian Prologon per nediskutebla aserto “Neniu iam vidis Dion”. Sankta Johano malkonfirmas la Sanktajn Skribojn, ĉar en la “Eliro”, en la “Readmono” kaj en aliaj sanktaj skriboj oni klare asertas ke Moseo, Aaron, aliaj sepdek homoj vidis Dion. Jesuo ne akordas kun li, neniu iam vidis Dion.

Do, se neniu iam vidis Dion, eĉ ne Moseo Lin vidis, tiu kiun oni prezentas kiel volon de Dio estas neperfekta volo. Sankta Johano skribas: “Neniu iam vidis Dion; la solenaskita Filo, kiu estas Dio, kiu estas en la sino de la Patro, Lin deklaris”. En la sino signifas la plenan intimecon.

Jesuo ne estas kiel Dio, sed Dio estas kiel Jesuo. La evangeliisto invitas la leganton forstreki ĉion kion li scias, aŭ li opinias scii pri Dio kaj ĉion kompari kun tio, kion Jesuo faros aŭ diros. Se la du aferoj koincidas inter si li tion konservu. Se, kontraŭe la du aferojn ne koincidas inter si aŭ sin kontraŭdiras reciproke ili estas forstrekindaj.

Kion signifas la diro ke Jesuo ne estas kiel Dio? Se mi diras ke Jesuo estas kiel Dio, tio signifas ke mi havas iun bildon, iun ideon pri Dio. Ne. Ne Jesuo estas kiel Dio, sed Dio estas kiel Jesuo. Ne ekzistas alia Dio krom tiu kiun ni vidas en Jesuo. Tio estas kion Jesuo respondos kiam la Apostolo Filipo diros al li: ”Montru al ni la Patron kaj tio sufiĉas al ni”, kaj Jesuo diros al li: “Kiu vidis Min tiu vidis la Patron”.

Do Jesuo sin prezentas kiel plenan kaj videblan manifestigon de Dio, de la dia kondiĉo. Kaj estas ĝuste por tio ke li venas inaŭguri novan raporton kun Dio, kiu ne plu baziĝas sur la observado de la leĝo, kiel estis por Moseo, sed kiu baziĝos sur la akcepto de Lia amo kaj sur la simileco al tiu amo mem.

Fakte la antaŭa versego sonas tiel: “Ĉar la leĝo estis donita per Moseo; la graco kaj la vero estiĝis per Jesuo Kristo”. Moseo, la diservanto, trudis interligon inter Dio kaj lia popolo kiu estis bazita sur la obeo al Lia leĝoj; Jesuo, kiu estas la Filo de Dio, venas proponi interligon inter filoj kaj ilia Patro, kiu baziĝas sur la akcepto kaj sur la simileco je lia amo.

Tiu ĉi esprimo “graco kaj vero” signifas abundan amon kiu sin donas. Amo kiu ne naskiĝas de la bezono de la homo, sed ĝin antaŭas, amo kiu eĉ antaŭeniras la kreon mem kaj estas ĝia sekvo. En la 14a versego ĉiam retroirante, la evangeliisto diras ke “La Vorto”, vorto signifas tiun vorton kiu estas la projekto de Dio pri la homaro kaj kiu per Jesuo plene realiĝas, “li fariĝis”- la evangeliisto ne skribas ke li fariĝis homo, sed ke li “fariĝis karno”, indikante tiamaniere la homon en lia febleco.

“Kaj li loĝis”, li starigis sian tendon, “inter ni”. Per Jesuo Dio loĝas inter la homoj, Li reprenas la rolon kiu estis jam la Sia ekde la komenco, kiam oni metis Lin en tendon kaj Li akompanis sian popolon. Tio signifas ke pere de Jesuo Dio ne devas plu esti serĉata, sed Li devas esti akceptata kaj kun Li kaj kiel Li oni devas iri renkonten al aliuloj.

La 12a versego estas la plej grava, la evangeliisto ĝin metas ĝuste meze de sia Evangelio. “Al ĉiuj, kiuj lin akceptis”, al ĉiuj kiuj akceptis tiun projekton de Dio kiel projekton de vivo kiu efektiviĝas pere de Jesuo, “Li donis la rajton fariĝi filoj de Dio”. Jen la projekto de Dio pri la homaro: homo posedanta la dian kondiĉon.

Kaj kiel oni tion atingas? Ĉu per preĝmanieroj, ĉu per apartaj religiaj vivstiloj, aŭ per kio ajn alia? Tute ne, akceptante Jesuon; akcepti Jesuon signifas akcepti tiun ampovon en la vivo mem kaj ĝin disvastigi kaj komuniki al aliuloj. Direkti kiel Jesuo sian propran ekziston favore al libereco kaj digno de ĉiu homo.

Ni iru ĉe la komenco de la Prologo, kie la evangeliisto, kiel jam li malkonfirmis la Malnovan Testamenton laŭ kiu Moseo kaj aliaj homoj estis vidintaj Dion, li eĉ korektas la Genezon. La libro de Genezo komencas per la vortoj: ”En la komenco Dio kreis la ĉielon kaj la teron”, la evangeliisto

ne konsentas pri tio:”En la komenco estis”- nome jam ekzistis- “la Vorto”, nome, jam ekzistis tiu vorto de Dio kiu entenas krean projekton kaj ĝin efektivigas.

Estis vorto. En la hebrea tradicio oni asertis ke en la komenco, jam antaŭ la kreo, estis la dek vortoj, la dekalogo aŭ la “dek ordonoj”. Tute ne, laŭ la evangeliisto en la komenco estas vorto kiu poste sin esprimos per ordono, kaj tiu vorto “Estis kun Dio” , oni konsultis ĉiam ĝin ĉe Dio, kaj tiu Vorto “estis Dio” aŭ laŭlitere ĝi estis iu Dio.

La projekto de Dio pri la homaro estas ke la homo havu la dian kondiĉon. Kiam oni akceptas tiun Projekton, ĉe la versegoj 4a kaj 5a oni sentas eksplodon, liberigon, vivenergion en la homo kiu estos la lumo kiu lin gvidos. Ne estas ekstera lumo kiel povis esti la leĝo kiu gvidadis la paŝojn de la homoj, sed ĝi estas intima lumo kiu estas la respondo al la deziro de vivpleneco, kiu estas tiu kiu lumigas kaj gvidas ĉiun homon.